

VENEZUELA

STELO

Organo de **VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO**

30-a Jaro = N. 71 = 1-a Semestro 2002

ISSN 1316-0451

JARO 2002: DATREVENOJ POR V.E.A.

La jaro 2002 ne estas ajna jaro por nia Venezuela Esperanto-Asocio, ĉar ĝi prezentas pli ol unu motivo por festi. Ni troviĝas antaŭ ne komuna jubileo, kiu signas la 90 jarojn kiuj fluis ekde 1912, kiam grupo de entuziasmaj idealistoj fondis nian Asocion en la urbo Maturín.

Sed pro feliĉa koincido, ĉijare ni festas ankaŭ la 110-an naskiĝ-datrevenon de la unua prezidanto de VEA, S-ro Benito Losada Azócar, kiu forpasis ekzakte antaŭ 30 jaroj. Li postlasis pioniran movadon en nia lando, kaj restas en la memoro de la nunaj kaj estontaj esperantistoj danke al la asocia biblioteko kiu ricevis lian nomon.

La datrevenoj donas apartan gravecon al la Esperanto-Renkontiĝo, kiun ni planas efektivigi de la 8-a ĝis la 10-a de novembro 2002 en Karakas, kunlabore kun la kolombiaj samideanoj. La evento jam estas en la kalendaro de la Esperanto-agadoj kiel UNUA VENEZUELA/KOLOMBIA ESPERANTO-RENKONTIĜO.

La soci-politikaj cirkonstancoj kiuj karakterizas nuntempe ambaŭ landojn ne permesas optimisman prognozon rilate multnombrian partoprenon fare de enlandaj kaj eksterlandaj kongresanoj. Tamen ni taksas aparte grava la eventon, ĉar okaze de la dulanda renkontiĝo eblas analizi la nunan staton, la komunajn kaj malsamajn trajtojn, la koncernajn mediojn kaj la tagajn strategiojn por atingi la celojn de kontentiga disvastigo de Esperanto en la du landoj kaj en la regiono.

Tamen mi ne kaŝas la senton, ke kvankam la Laninamerikaj landoj konstituas fekundan ankoraŭ ne ekspluatitan teron, tre malfacile oni povas kredi je amasa esperantigo de la homoj en nia kontinento. La unulingva karakterizo kaj la konataj malfacilaj ekonomioj de niaj landoj maloftigas la personajn kontaktojn kun eksterlandanoj en aliaj kontinentoj, preskaŭ nuligante la bezonon je iu helpa lingvo por la interkomunikiĝo fare de la popolaj tavoloj de nia loĝantaro. Tio signifas ke Esperanto kiel lingvo povas havi ian signifon nur por elita grupo, konsistigata de homoj el la profesiula kaj edukita sferoj.

Pli verŝajne ekzistas eblecoj por Esperanto kiel koro de humaneca movado. La "Interna Ideo", kiu trans politikaj, sociaj, religiaj, etnaj kaj rasaj vidpunktoj, instigas al la frateco kaj al la kunlaboro, al la reciproka respekto kaj al la komuna volo forigi la diferencojn, povus estiĝi katalizilo de bonintencaj iniciatoj kaj lumigi eblajn vojojn por atingi la pacon kaj la komunan bonstaton por niaj gentoj.

La jubilea jaro 2002 puŝas nin analizi nian 90-jaran iradon, kaj fari bilancon kiu ebligas la adopton de tagaj strategioj kapablaj malkovri kaj flankenigi la erarajn iniciatojn kaj produkti pozitivajn atingojn. Ni nepre bezonas fokusi niajn malmultajn homfortojn sur serioze elektitajn agadojn, por multobligi la aktivojn de nia pasia volontula laboro, kiun ni kutime rigardas ne kiel libertempan okupon, sed kiel veran vivcelon.

Andrés Turrisi

<p style="text-align: center;"><u>VENEZUELA STELO</u></p> <p style="text-align: center;">VENEZUELA</p> <p style="text-align: center;">http://www.esperanto-ve.org http://www.venesperanto.com-1.net esperanto-en-venezuela@yahoo.com</p> <p><u>REDAKCIA KOMISIONO:</u> Félix García Blázquez, Jorge Mosonyi, Nancy Aquino, Esperanza Pérez, Andrés Turrisi.</p> <p><u>ELDONANTO:</u> FUNDAESPERANTO</p> <p style="text-align: center;"><u>VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO</u></p> <p style="text-align: center;">Apartado 47675, Caracas 1041 – A http://www.esperanto-ve.org http://www.venesperanto.com-1.net venesperanto@cantv.net, venesperanto@tutopia.com</p> <p><u>ESTRARANOJ:</u> PREZIDANTO: Jorge Mosonyi. VIC-PREZIDANTO: Peter Jaimez. ĜENERALA SEKRETARIO: Andrés Turrisi. KASISTINO: Esperanza Pérez. VOĈONANTOJ: Agnes Waldman, Nancy Aquino, Yuri Yakimec, Rubén Alfonsín.</p> <p><u>KOMISIITOJ:</u> <u>BIBLIOTEKO KAJ LIBROSERVO:</u> Peter Jaimez. KORESPONDAJ KURSOJ, ELDONADO KAJ PROTO-KOLADO, VENEZUELA STELO: Andrés Turrisi. TTT-PAGXOJ: Víctor Sirvent kaj Jesús Cedeño <u>KONSILANTOJ:</u> Félix García Blázquez, Esteban Mosonyi, Alfredo Portillo. <u>HONORAJ MEMBROJ:</u> Juan E. Bachrich, Guillermo A. Cook, Fernando De Diego. <u>ENLANDAJ DELEGITOJ:</u> Héctor Delgado T. (Mérida), Alfredo Ovalles (Maracay), Germán Montero (Maracaibo), Jesús R. Cedeño (Maturín kaj Ciudad Bolívar). <u>JUNULARAJ AFEROJ:</u> Mayrim Sandoval (Punto Fijo). <u>ALIĜINTA ASOCIO:</u> ZULIA ESPERANTO-ASOCIO.</p>	<p style="text-align: center;">ATENTIGO</p> <p style="text-align: center;">Pri la enhavo de niaj artikoloj respondecas iliaj a toroj.</p> <p style="text-align: center;">Manke de indiko de la a toro, respondecas la redakcio.</p> <p style="text-align: center;">Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte a plene repu-blikigataj por la leĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton.</p> <p style="text-align: center;">Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni anta dankas la kunlaborantojn.</p>
--	--

NACIAJ NOVAĴOJ

La 10-an de novembro 2001 nia Asocio celebris la jaran asembleon, okaze de kiu ni renovigis la estraron. Verdire, la renovigo rezultis minimuma, ĉar plejparte estas reelektitaj la samaj anta aj estraranoj. La notindaj novaĵoj estis la jenaj: 1) post tridekjara bonega plenumado, Prof-ro Juan E. Bachrich transdonis la postenon de Ĝenerala Sekretario al S-ano Andrés Turrisi, kaj 2) Mayrim Sandoval fariĝis la nova junulara delegito. La Asembleo unuvoĉe nomumis Prof-ron Bachrich Honora Prezidanto de Venezuela Esperanto-Asocio

Kiel jam kutime depost multaj jaroj, denove ni okazigis sukcesan Zamenhofan Vesperon ĉe la Familio Bachrich, en Karakas. La 14-an de decembro 2001, en la evento partoprenis 32 personoj kiuj gxuis eksterordinaran amikecan etoson.

Anka en Marakajbo grupo da geamikoj festis la naskiĝtagon de Zamenhof. La kunveno okazis en la sidejo de la Spirita Societo "La Vojo". Nia amiko David Valecillos, aktiva en tiu urbo, kutimas gvidi kursojn por plenkreskuloj, junuloj kaj infanoj kaj efektivigi alispecajn agadojn: ekspozicioj, teatraĵoj ktp. Anta kelkaj jaroj li sukcesis starigi simplan sed signifoplenan monumenton fronte al la enirejo de la flughaveno. La monumento nun troviĝas difektita fare de vandaloj, kaj S-ano Valecillos klopodas restarigi ĝin.

La plurjara kalendaro, ĉijare okazos Tutlanda Esperantista Renkontiĝo, la 9-a de la serio. Tio signifas apartan laboron por la manpleno da venezuelaj aktivuloj. Tamen ni estas anta eksterordinara defio, ĉar la lastajn monatojn ni atentis la proponon, faritan de la iama Prezidanto de la Kolombia Esperanto-Ligo, Rubén Torres, organizi komunan dulandan kongreson. Komence timide, la ideo nun maturiĝas, kaj en amba landoj oni konsideras serioze la projekton okazigi tian eventon en Karakas. Oni fiksas eĉ la daton: 8-10/11/2002. La soci-politikaj situacioj de niaj landoj ne estas la plej bonaj, ĉimomente; tamen oni laboras por la efektivigo de la signifa renkontiĝo, kiu sin proponas kiel ekzemplon sekvindan fare de aliaj amerikaj landaj asocioj.

Post jaroj de senaktivado, denove ekfunkcias la ILEI-sekcio de Venezuela Esperanto-Asocio. Ĝin konsistigas 7 membroj, kiuj intencas labori vigle ne nur koncerne la landan situacion de la Esperanto-instruado, sed anka por funkciigi la Hispanlingvan ILEI-sekcion, kiu devus kunordigi la strategiojn de la instruado en ĉiuj hispanlingvaj landoj.

Kadre de la normalaj kaj konstantaj iniciatoj por la instruado de Esperanto, oni klopodis organizi du enkondukajn kursojn kiujn gvidus Prof-ro Juan Negrete, kun lecionoj marte kaj ĵa de kaj kun daŭro de 20 horoj. La kursoj komenciĝus la 28-an kaj la 30-an de majo, respektive, kaj funkcios en la asocia sidejo. Pluraj afiŝoj estas eksponitaj en publikaj bibliotekoj kaj en aliaj ta gaj lokoj, kaj faldfolioj estas disdonitaj en la Centra Universitato, sed bedaŭrinde la planoj ne sukcesis, pro nesufiĉaj aliĝoj.

Membroj de la Estraro finrevizias tradukojn de gravaj verkoj de la Liberato Simón Bolívar. Oni planas eldonigi la tradukojn, kiuj eble estos prezentataj al la publiko okaze de la 1-a Venezuela/Kolombia Esperanto-Renkontiĝo, en novembro, kiam nia Asocio festos la 90-jariĝon de sia fondiĝo.

INTERNACIAJ NOVAĴOJ

Ĉijare la Internacia Esperanto-Junularo celebros sian internacian kongreson en Pato Branco, Brazilo, de la 21 ĝis la 28-a de Julio. La temo de la kongreso estos la jena: "Lingvo, Kulturo kaj Oportuneco". Post la kongreso, multaj partoprenintoj a tობuse karavano al Fortaleza por partopreni en la Universala kongreso. La vojaĝo da ros unu semajnon, kaj la bonŝanculoj ĝuos nekredoblajn vidindaĵojn, kio entute lasos en ili neforgeseblajn impresojn kaj rememorojn pri sperto malfacile ripetebla dum sia tuta vivo.

De la 3-a ĝis la 10-a de a gusto disvolviĝos en Fortaleza, Brazilo, la 87-a Universala Kongreso de Esperanto, pinta jara evento de la monda Esperanto-movado. La kongresa temo : "Diverseco: ŝanco, ne minaco". Unuafoje en Brazilo, en 1981 Brasilia gastigis la UK. Ĉijare, ĉe la dua okazo, ni havas la esperon ke iu tria ebleco konkretiĝos post malpli longa atendo.

La longe preparolata estigo de hispanlingva ILEI-Sekcio, kiu arigus la ILEI-anojn el ĉiuj hispanlingvaj landoj, ŝajne fariĝas realaĵo. UEA, ILEI kaj IEI rigardas favore al la ideo. S-ano Andrés Turrisi, el Venezuelo, akceptis kunordigi la agadojn de la sekcio, kaj invitas la hispanparolantajn individuajn membrojn de ILEI kun alirebleco al la reto, aliĝi al la diskutlisto

ILEI-hispanlingva@yahoogroups.com, sendante vakuan mesaĝon al:

ILEI-hispanlingva-subscribe@yahoogroups.com.

HISPANLINGVA ILEI-SEKCIO

Okaze de la 5-a Tutamerika Kongreso de Esperanto (5-a TAKE) en Meksikurbo, la kongresanoj aprobis la proponon de Atilio Orellana starigi internacian ILEI-sekcion, kun membroj el hispanlingvaj landoj.

La la statuto de ILEI, en ĉiu landa Asocio povas funkcii ILEI-sekcio kondiĉe ke ĝin konsistigu minimume 5 (kvin) membroj. Certe Hispanio plenumas tian kondiĉon, kaj en Latinameriko ankaŭ Argentino, Kubo kaj Venezuelo. Sed en pluraj aliaj landoj hispanlingvaj de nia kontinento, nur troviĝas izolitaj observantoj. La projekto por krei hispanlingvan ILEI-sekcion celas kunigi en fortan super-nacian sekcion tiujn unuopajn observantojn, antaŭ kiuj leviĝas la grava defio forigi la izolitecon, unuigi la fortojn kaj kune labori por solvi la malfacilaĵojn de la Esperanto-instruado en nia regiono, utiligante kaj kreante komunajn informajn kaj instruajn materialojn.

Iom post iom la projekto akiras konkretecon, kaj post la unuaj paŝoj, jam estas tempo diskonigi ĝin kaj kontakti la eblajn membrojn, por komenci koni nin reciproke, interŝanĝi opiniojn, ellabori laborplanon, kolekti informojn pri la materialoj ĝis nun utiligataj kaj fari liston de la bezonataj lerniloj kaj informiloj. La tasko, certe laboriga, ne devus esti aparte malfacila, unue pro la avantaĝo de la unulingveco koncerne la informadon al la neesperantista publiko.

La invito fare de Atilio Orellana, la venezuelano Andrés Turrisi akceptis la taskon kunordigi la agadojn de la hispanlingva ILEI-Sekcio, kaj por faciligi la kontaktojn kaj interrilatojn, la kolombiano Rubén Torres kreis la diskutgrupon ILEI-hispanlingva@yahoogroups.com, kiu jam funkcias. Mi kore invitas vin aliĝi al tiu grupo, sendante vakuan mesaĝon al:

ILEI-hispanlingva-subscribe@yahoogroups.com

La listo estas tute libera, funkcias en Esperanto, kaj estas destinita al la pritrakto de temoj koncernantaj la funkciadon de la ILEI-Sekcio. Ĉiuj ILEI-anoj en ĉiuj hispanlingvaj landoj rajtas aliĝi al la Sekcio kaj al la diskutgrupo. Tiuj kiuj ne havas aliron al la reto, povas sendi mesaĝojn pere de kolegoj kiuj havas tiun eblecon, aŭ uzi la normalan poŝtservon, kiu bedaŭrinde en kelkaj niaj landoj (precipe en Venezuelo) estas terure malrapida kaj malefika. En oportuna tempo ni informos pri la poŝta adreso de la hispanlingva ILEI-Sekcio.

Andrés Turrisi
andesp@internet.ve

Lingva Angulo

Félix García Blázquez

FUNDAMENTECO EN LANDNOMOJ

Fundamentaj vortoj estas tiuj kiuj aperas en la Fundamento t.e. a en la Gramatiko, a en la Ekzercaro, a en la Universala Vortaro, a eĉ en la Anta parolo de tiu dokumento. Ili estas markitaj per asterisko en PIV (1).

Oficialaj vortoj estas tiuj aprobitaj far la Akademio kaj publikigitaj en la Oficialaj Aldonoj. Ili estas markitaj per cifero superskribita sur la aprobita vorto (1).

Rilate al la polemiketo aperinta en Venezuela Stelo (nº 70) pri la landnomoj Urugvajo kaj Gvatemalo, oni devas diri ke amba partoprenintoj ne bazis siajn asertojn – ili praktike koincidas en la fundamenteco de tiuj nomoj -, ĉar ne citis en kiu parto de la Fundamento aperas tiuj vortoj.

Aliflanke, oni uzis la adjektivon “lafun damenta” por enklasigi tiujn landnomojn. Tiurilate, tial ke mi asertis en V.S. nº 69 p. 8 ke la transliterigoj *Gvatemalo* kaj *Urugvajo* ne estis konformaj kun la 15-a regulo de la fundamenta gramatiko, mi ŝuldas klarigojn al niaj legantoj.

Por tiu demonstro mi utiligos la francan version – pro ties klareco kaj kompleteco – de la citita regulo kiu tekstas jene:

“La tiel nomataj vortoj *fremdaj* estas uzataj en la lingvo internacia sen ŝanĝo ricevante nur la ortografion kaj la gramatikajn finaĵojn de tiu ĉi lingvo” (2).

Tio signifas ke la procedo de la esperantigo de la fremdaj vortoj konsistas el du etapoj: 1) la fonetika transskribo de la nacilingva termino per E-literoj kaj 2) la aldono de la finaĵo –o, a la ŝanĝo de la lasta vokalo de la koncerna nomo.

En la ekzemplo de “Uruguay”, la fonetika adapto devas esti *Uruga j* kaj por “Guatemala” devas esti *Gat emala*. Post la aldono de la ĝusta vokalo a la ŝanĝo de la originala finaĵo, la rezultoj devas esti: **Uruguájo** kaj **Güatemalo**, **respektive**.

Sekve, se oni oficialigis la vortojn Urugvajo kaj Gvatemalo (3), tio simple signifas ke la responsinto(j) de tiuj transliterigoj ne konis la fonetikon de la hispana, kiu estas la oficiala lingvo de la referencitaj landoj.

Nu bone, mi estas ĵus demonstrinta ke la kritikitaj terminoj estas **ne lafu ndamentaj**, kaj plie mi ada cas deklari ke ili estas **kontraf undamentaj** pro la fakto ke ĉe ilia adapto oni malobeis la 15-an regulon de la fundamenta gramatiko.

Rilate al la argumento ke nur validas la reguloj aperintaj en la rusa versio de la Fundamento, la ator o de tiu tezo ne indikis en kiu parto de tiu dokumento oni preskribis ke la diftongon “ua” de ajna natura lingvo oni devas transskribi per “va”. Do, la argumento lamas, t.e., ĝi ne validas.

Aldone, se oni plenumus tiun procedon por la nomo de nia lando, - en E-o ĝi devus esti *Venezuelo* – la literparo “ue” estas diftongo -; sed mi estas tute certa ke neniu saĝa esperantisto akceptus tiun kontran aturan nomiĝon.

Notoj

1 – WARINGHIEN k.a. – Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Parizo 1970. p. XXXVI.

2 – L.L.ZAMENHOF – Fundamento de Esperanto. Marmande 1963. p. 303.

3 – AKADEMIO DE ESPERANTO – Oficiala Bulteno N° 10(1969 – 1974) p. 13.

AVIADILLO: ĈU FUNDAMENTA A KONTRA FUNDAMENTA?

Se per fundamenta vorto ni komprenas vorton kiu ekzistas en la Universala Vortaro de la Fundamento, a en alia parto de ĉi tiu dokumento, evidente “aviadilo” ne estas fundamenta vorto. Tio preska ne bezonas esploron, ĉar tiu veturilo ne estis inventita kiam aperis la Unua Libro.

Anka ĝi ne estas oficiala, t.e. aprobita far la Akademio, ĉar la nia scio tiu institucio, nur aprobas primitivajn vortojn, propre ne derivitajn vortojn.

Tamen, ni analizos ĉu la formado a derivado de tiu kritikata termino estas lafundamenta a ne.

La fakto ke tiu termino estas kaj estis delonge uzata, ne nepre signifas ke ĝi estus korekte formita, tio ja povus esti solecismo, spita la ĝenerala uzado, kaj la prestiĝoj de ties uzantoj.

Por demonstri la fundamentecon a kontrafun damentecon de io, kompreneble oni devas zorge ekzameni la cititan dokumenton.

Nu, se “aviadilo” derivas de “aviado” (ĉi lastan vorton la Akademio aprobis en la tria oficiala aldono), ŝajne estas lica uzi la vorton “aviadilo”. Tio estas certa: tamen, ĉi kaze la signifo nur povas esti instrumento por aviadi, kaj ni atentu, instrumento ne estas maŝino. Ĝuste en aktivaj tempoj de la historio de Esperanto oni uzadis la terminon “flugmaŝino”, kiun hodia oni konsideras arkaismo. Tiuteme, por –il’ la Universala Vortaro, indikas en angla versio “instrument”, en la franca “instrument” kaj en la germana “Werkzeug”. Do, se aviadilo estas instrumento, ĝi neniel estas maŝino, veturilo, a kiel oni volus nomi ĝin.

Konklude, en la derivado de diskutata vorto, oni malatentis la fundamentan signifon de la koncerna sufikso.

Kiu, do, estas la korekta? Oficiale aprobita estas “aeroplano”, sed se la uzantoj konsideras tro longa tiun terminon, ekzistas la neologismoj “avio” kaj “aviono”. Ĉi lasta estas el amba, la pli internacia, ĉar en franca lingvo ties ekvivalento estas “avion”, en hispana “avión”, kaj en portugala “aviao”.

La uzantaro decidis kiu termino estos preferinda.

ALTERNATIVOJ AL LA ESPRIMO “ĴUS –IS”

En iu konata vortaro oni legas: “Ĵus. Adv. Signifanta “anta nun” a “anta tiam”, (1) kaj en la ekzemplo “ĵus batis la sesa horo” se oni disponas je la kunteksto ne eblas determini ĉu temas pri la unua a pri la dua signifo. Tiu neprecizeco ne kongruas kun la esenco de la lingvo kaj por eviti tiun malklaraĵon ni proponas la jenon:

Antae oni memoru ke”... ĉiun bonan regulon, bonan formon, bonan esprimon, kiu ekzistas en kiu ajn lingvo, lingvo arta havas la plenan rajton aligi al si ...” (2).

Efektive en angla lingvo, la ekvivalento de “Li ĵus alvenis” estas:

He has just arrived

a

He had just arrived

depende de la referencita momento.

Do, en Esperanto, la rekomendindaj formoj pro sia precizeco estus:

Li estas ĵus alveninta

sen ke oni rajtus kvalifiki tiujn formojn kiel idiotismojn.

BIBLIOGRAFIAJ NOTOJ

- 1 – Waringhien G. Kaj aliaj. Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Parizo 1970. p. 462.
- 2 – Zamenhof L.L. Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto. Rickmansworth 1954. p. 277.

ĈU ESPERANTO UTILAS KIEL KOMPRENILON

INTER BATALANTOJ SAMLANDAJ KAJ SAMLINGVAJ?

Andrés Turrisi

Kiam per la modernaj informmedioj ni konas la militajn eventojn kaj la internajn konfliktojn kiuj maltrankviligas la homojn en dekoj da landoj tutmonde, ni kutime sentas kompaton al niaj foraj similuloj el kiu ajn flanko, kaj la la spirito kiu karakterizas la esperantistojn, ni multobligas niajn klopodojn por malfermi eblajn vojojn al la pacigo de la partoj, sugestante Esperanton kiel komuna lingvo por faciligi la interkomprenigon.

La scenejo estas tute alia kiam la eventoj tragike kaj angore tuŝas nin mem de proksime, en nia propra lando, kaj ni konscias ke nian esperantistan kutiman, regulan, ekzempligan, unitaran sintenon kaj emon bremsas la fakto ke, kiel individuoj, ni maloftege kaj tre malfacile kapablas juĝi restante “super partes”, ĉar la popolo estas multkapa komunumo kun ekstrema malsameco. Ni estas membroj de tiu komunumo, kaj tre verŝajne havas malsamajn kredojn politikajn, sociajn, etikajn, ktp. Kiam la kontrastara j vidpunktoj tuŝas nin, ni ne povas invoki Esperanton kiel lingvoponton por la interkompreniĝo kaj kiel instrumento por alproksimigi la ekstremojn. Jam ne temas pri malkompreniĝo pro lingva malsameco, ĉar kompreneble en iu ajn lando, spite al la ebla etnodiverseco, regas unu komuna oficiala lingvo. Tiukaze valoras nek la komunika nek la movada aspekto de Esperanto.

En la nunaj tagoj Venezuelo vivas angorajn situaciojn, ĉar radikalaj vidpunktoj apartigas la kuncivitanojn. Venezuelo Stelo ne estas la plej tag a forumo por komenti la hodia ajn cirkonstancojn, nek estas nia intenco analizi ilin. Mi venis al la konkludo ke ĉi tie, kiel anka en ĉiu alia lando kiu suferas politikajn konfliktojn, estas bezonata edukado al eternaj principoj kies observado povas generi sinceran emon al la interhoma paco.

Mi proponas la sekvan tekston de Giuseppe Mazzini, itala patrioto de la 19-a jarcento, kies konceptojn mi taksas aktualaj.

POPOLEDUKADO

La vivpova demando kiu agitiĝas dum nia jarcento estas Edukada demando. Necesas proponi al konsento de la nacio, liberigita por esprimi sian volon, ordon ŝajnantan plej bona, kaj *eduki* la homojn, per ĉiuj eblaj rimedoj, al ĝia disvolviĝo, al konforma agado. Per teorio de l' rajtoj ni povas ribeli kaj renversi la barojn; sed ne fondi fortan kaj da ran harmonion inter ĉiuj elementoj formantaj la Nacion. Per teorio de l' feliĉo, de l' *bonstato*, donita kiel ĉefa celo en la vivo, ni ricevos egoistajn homojn, materiajn adorantojn, kiuj kunportos en novan ordon la malnovajn pasiojn, kaj ilin malpurigos post kelkaj monatoj. Necesas do eltrovi edukigan principon, superan je tiela teorio, gvidontan la homojn al plejbono, instruontan al ili la konstantecon pri ofero, alligontan ilin al iliaj fratoj, ne dependigante ilin de nurula ideo a de ĉiesa forto. Kaj ĉi-tiu principo estas la *Devo*. Necesas konvinki la homojn ke ili, idoj de unu sola Dio, devas tie-ĉi sur la tero esti

plenumantoj de unu sola Leĝo – ke ĉiu el ili devas vivi, ne por si mem, sed por la aliaj – ke la celo de ilia vivo ne estas igi sin pli a malpli feliĉaj, sed plibonigi sin kaj la aliajn – ke batali la maljustecon kaj la eraron por la bono de fratoj, kie ajn ili troviĝas, estas ne nur **rajto** sed **devo**, devo ne malzorgata sen kulpo, dumviva devo...

G. Mazzini

El la itala trad. M. ARABENO

(Giuseppe Mazzini, *Devoj de la homo*, Genova, Lab. Esperanto-Grupo, 1922, p. 19-21).

PROTEKTO AL LA INDIĜENA TRADICIO

Datenbanko por konservi prapatrajn konojn

La riĉo de la indiĝenaj popoloj, ties kredoj kaj moroj, kaj la elementoj de la biodiverseco per kiuj ili rilatiĝas inter si, jam havas defendanton.

Venezuelo fariĝis unu el la iniciatintoj de la protektado de la tradiciaj konoj, per propono kiu atingis rekonon far aliaj Landoj okaze de la kunveno de la Interregistara Komitato pri Intelektorajtoj, okazinta en Ĝenevo, kaj organizita de la Monda Organizo de la Intelektorajtoj.

La programo, kiun antaŭenigas la Ministerio pri Scienco kaj Teknologio, koncernas la datenbankon "Biozulua", projekton de la Fondaĵo por la Disvolvo de la Fizikaj, Matematikaj kaj Naturaj Sciencoj, kiu sukcesis stoki per fotoĵoj, vidbendoj, tekstoj kaj sonoj, la informojn de la diversaj etnoj pri plantoj kaj bestoj, utilaj por la alimenta kaj medikamenta sektoroj.

La Vic-Ministrino pri Planado kaj Disvolvo de Scienco kaj Teknologio, pere de tiu ĉi projekto, celas protekti la nacian biodiversecon kaj la miljarajn konojn de la indiĝenaj popoloj.

La Vic-Ministrino denuncas: "Nuntempe ne ekzistas kontrolo sur la profitadon de tiuj informoj. Laŭ la denuncoj faritaj de la indiĝenaj komunumoj mem, la esploristoj el diversaj Landoj kaj entreprenoj tra la mondo vojaĝas al la sudo de la Lando kaj akiras informojn pri plantoj kaj procedoj realigataj de la etnoj, kiuj plejmulte utilas por la ellaborado de produktoj kosmetikaj kaj apotekaj. Bedaŭrinde la provizantoj de tiu informaro ne ricevas profiton. Ĉi problemoj ne tuŝas nur Venezuelon: Brazilo, Peruo kaj Ekvadoro spertas similajn situaciojn. Ni pretendas ellabori la postulatojn kapablajn starigi la ludregulojn, celante la haltigon de tiaj agoj.

De tie fontas la graveco de ĉi tiu iniciativo de konservado. Aliaj Landoj en similaj situacioj jam komencis peti al Venezuelo teknikan asiston por la disvolvo de samtipaj datenbankoj.

La Ministerio pri Scienco kaj Teknologio kunvenos kun la reprezentantoj de la Regiona Organizo de Indiĝenaj Popoloj el Amazonio por aŭdi ĉiujn ties plendojn kaj determini la mekanismon por interkonsento, tio estas, la manieron negocadi en la estonto inter la indiĝenoj kaj tiuj esploristoj kiuj dezirus atingi ties informojn.

(El la ĵurnalo *El Universal*, 08-07-2002)

Venezuelaj Rakontoj

Antonio Crema

IO TRE SIMPLA

--- Bonan matenon, Fra lino:

--- Bonan matenon, Sinjoro. En kio mi povas helpi vin?

--- En io tre simpla – Li eligis skribilon kaj papereton – Ĉu ekzistas iu speciala vakcino kiun oni devas apliki al si por povi vojaĝi al Jamaiko?

--- Speciala vakcino? --- ŝia tono iom deviis disde la nivelo akcepteble ĝentila --- kiaspeca?

--- Bone --- li ra kis, elegante --- io kia ĥolero, bubona pesto, flava febro, silva febro, ktp.

--- Sinjoro --- ŝia tono jam estis tute frida --- kio estas Jamaiko viaopinie?

--- Tutsimple --- li levis la voĉon, preska gaje --- mi kredas ke ĝi estas la plej mirinda lando en la mondo.

--- Ĉu vere? --- ŝi demandis, mirige --- Kaj kiel vi tion scias?

--- Bone, tio estas evidenta. Vi estas jamaikanino, ĉu ne? Tio estas ĉio. Tio pruvas ĉion... simpla, ĉu ne?

--- Sed, ĉu vi, la viroj, ne scias fari alian aferon? Diri aliajn vortojn?

--- Fra lino, pardonu min. Sed, kio okazas?

--- Nenio --- ŝi ekbruligis cigaredon --- Ĉu vi planas vojaĝi al Jamaiko?

--- Kompreneble ne.

--- Do bone, kial vi demandas tiom da stultaĵoj kaj diras tiom da impertinentaĵoj?

Siavice, li ekbruligis cigareton.

--- Mi tuj klarigos al vi, tio estas tre simpla. Sed, anta ĉio, respondu al mi. Ĉu mi bezonas a ne vakcinon?

--- Ne.

--- Tio estas perfekta. A du min. Ĉimatene, pli malpli je la oka, mi vidis vin eliri el la taksio kaj mi diris al mi: Ŝi estas mia!

--- Sinjoro!

--- Ekzakte. Kaj do mi diris al mi, a denove mi diris al mi, kio estas korekta, mi devas postiri ŝin kaj vidi kie ŝi laboras. Kaj mi sekvis vin ĝis ĉi tien, al la Ambassadejo de Jamaiko. Simpla, ĉu ne?

--- Sinjoro, mi...

--- Sed ne nur mi tion diris al mi. Mi ankaŭ diris al mi ke nenion valoris sekvi vin, vidi kie vi laboras, por poste komenci suferi kia idioto. Tiu ne estas mia stilo --- li levis konsiderinde la voĉon --- jjiNe!!!

--- Ne, kio? – diris timide la virino.

--- Ke mi ne lasus la aferon tiamaniere. Kaj mi denove diris al mi... Vi certe rimarkis... mi diras al mi mem multajn aferojn... ke mi klopodus paroli kun vi, almena kvin minutojn. Por ke vi sciu kiu mi estas, kia estas mia vizaĝo, ke mi enamiĝis je vi. Kaj ke estas bona

ke vi tion sciu, ĉar kaze ke vi ne korespondas al mi, vi almena scios kiun vi estas suferiganta. Kio jam estas io. Simpla, ĉu ne?

--- Sinjoro..., kaj poste?

--- Do, mi sukcesis. Mi parolis kvin minutojn kun vi. Kaj plie. Ni jam kverelis unuafoje. Mi estas progresanta, ĉu ne?

--- Sinjoro, pardonu min...mi devas iri al la direktorejo... ĝis...

---Ĝis.

---Bonan matenon, Fra lino.

---Vi, denove?

---Ah... vi rekonas min. Tio kuraĝigas min kaj kredigas min je la estonto.

---Sinjoro, mi ne havas tempon por perdi. Kion vi deziras?

Elpoŝigante pasporton ---Tre simplan aferon: mi bezonas vizon por vojaĝi al Jamaiko.

---Sed vi diris ke vi ne volas vojaĝi al Jamaiko!

---Kompreneble mi tion diris al vi! Kia memoro!

---Kaj do, kial hodia vi diras ke vi volas vojaĝi al Jamaiko?

---Ĉar hodia mi volas vojaĝi al Jamaiko. Tia mi estas. Ne ekzistas leĝoj malpermesantaj kaj, krome, la viaj vortoj mem, ne bezonatas ia speciala vakcino. Mi posedas pasporton. Ĉio estas tiel simpla! Mi nur bezonas la vizon, se vi bonvolos helpi.

---Mi tuj revenos, Sinjoro. Mi havigos al vi la subskribon de Sinjoro Ambasadoro.

Kelkajn minutojn poste ŝi revenis.

---Jen la vizo, Sinjoro.

---Dankon, Fra lino. Ĝis revido.

---Adia .

---Adia , sed anta e mi devas sciigi al vi aferon pri kiu, krome, ni amba jam estas komplikoj. . Kion vi opinias?

---Komplikoj? Sinjoro... mi...

---Jes, Fra lino. Temas pri io kion vi sciis hiera .

---Mi ne komprenas.

---Simpla, tre simpla afero.Hiera mi diris al mi, post kiam mi parolis kun vi, ke mi devas denove paroli kvin minutojn kun vi. Kaj mi ĵus sukcesis en tio.

--Mi petegas, lasu min trankvila!

---Kaj duafoje ni kverelis! Kompleta sukcesoj! Mia Dio, kiel simple!

---Sinjoro, adia .

---Adia .

---Bonan matenon, Fra lino.

---Mi petegas ke vi eliru el ĉi oficejo senprokraste.

---Fra lino...

---Nenio! Foriru jam!

---Bonvolu ne levi la voĉon, pro du motivoj tre simplaj. La unua, ĉar ĉi tiu estus nia tria kverelado en tri tagoj... kaj tio jam estus amo. Kaj, la dua, ke mi ne deziras paroli kun vi sed kun Sinjoro Ambasadoro (longa pa zo)...bonvolu.

---Kun Sinjoro Ambasadoro?

---Ekzakte. Simpla, ĉu ne?

Kvaza malproksima, sed maltrankvila kaj scivolema:

---Simpla. Nur estas detaleta: por povi paroli kun Sinjoro Ambasadoro vi devas diri al mi pri kio vi volas paroli kun li, por ke li decidu, unue ĉu li ricevos vin kaj, due, kiam. Simpla, ĉu ne?

---Tre simpla --- li metis karamelon en sian buŝon kaj ofertis alian, kiun ŝi rifuzis. ---Mi volas denunci al Sinjoro Ambasadoro tre seriozan neregulaĵon kiu okazis en ĉi ambasadejo, kiu damaĝas morale la funkciulojn, supoze honestajn, kiuj deĵoras en ĝi.

---Neregulaĵo? Kia neregulaĵo?

---Mi ne estas devigata tion diri al vi. Sed, tio estas tiel simpla! Hiera, kiam vi redonis al mi la pasporton kun la vizo, ene estis kvitanco je 20 Bolivaroj (1) pro konsulrajtoj, jam subskribita, kaj kiun mi ne pagis!

---Bone...iu forgeso... mi ne komprenas tion...

---Kial vi ne komprenas? Sed se tio estas tiel simpla!

---Sinjoro, konsente. Estis mia kulpo. Sed mi ne komprenas kial munti tian konfuzaĵon ka ze de io...tiel simpla.

---Bone. Tamen, mi insistos por paroli kun Sinjoro Ambasadoro. Escepte se...ĉar mi parolis kun vi pliajn kvin minutojn, kio estis mia celo, mi kredas ke plej simpla estus, ke ni irus al Jamaiko, vi kaj mi, ĉi semajnfino.

---Kaj ĉu vi pagus la dudek Bolivarojn?

---Kompreneble. Kaj ankaŭ la viajn.

Ekstarante:

---Jes. Mi kredas ke tio estas la plej simpla.

(1) Bolívar: monunuo de Venezuelo.

Esperantigita de: Andrés Turrisi)

El: Los tomates no tocan el violín (*La tomatoj ne ludas violonon*). Eldonejo Ex Libris. Karakas 1996. Paĝo 67.

A F I L I A T E A L A
ASOCIACIÓN VENEZOLANA DE ESPERANTO
PAGA TUS CUOTAS PUNTUALMENTE
APOYA NUESTRA ASOCIACIÓN
CONSIGUE NUEVOS MIEMBROS

ABONILLO

(Eltondu a kopiu ĝin)

Nomo (persono a asocio a gazeto):

Adreso: -----

(1) Mi deziras aboni Venezuelan Stelon por la jaro

kaj sendas:

- a) Ok i.r.k.; b) Filatelajn poŝmarkojn /_____/; c) libron kun titolo _____
- (2) Mi deziras ricevi (surface) Venezuelan Stelon interŝanĝe de la gazeto: _____ aperanta _____ foje jare.

Dato_____ SUBSKRIBO_____

**Sendu al: VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO, Apdo. 47675,
CARACAS 1041-A = VENEZUELA**

<esperanto-en-venezuela@yahoo.groups.com>

<venesperanto@tutopia.com>

OCcidental FORLASAS TERITORION U'WA EN KOLOMBIO

La simpatiantoj de la kolombia etna grupo U'wa celebras partan sukceson, ĉar la usona petrolkompanio *Occidental* diris ke ĝi forlasis sian klopodojn por malkovri nafton en terenoj kiuj estus parto de la teritorio de la anta uloj de tiuj ĉi indiĝenoj.

La pasintan jaron *Occidental* traboris puton kiu kostis 66 milionojn da dolaroj ĝuste fronte al la rezervejo de la U'wa, sed ĝi ne sukcesis trovi petrolon. "Temis baze pri ekonomia decido", informis la firmao.

Reprezentantoj de la indiĝenoj U'wa, apogataj de koalicio de internaciaj grupoj defendantoj de la homaj rajtoj kaj de la medio, estis realigintaj intensan kampanjon kontra la planoj de traborado fare de *Occidental*.

Tamen, Ecopetrol, la kolombia ŝtata petrolkompanio, diris ke tiu ĉi a alia entrepreno faros novajn provojn en la loko de la traborado dum la dua mezo de ĉi jaro.

(Traduko de artikolo de James Wilson aperinta hispane en la venezuela ĵurnalo "El Universal" la 9-an de majo 2002)

